

STARTO

N-ro 3/2021 (280)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Vitrofareja ĝardeno en Kunratice u Cvikova

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj: sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo, skribu al: muzeo@esperanto.cz

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gvidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Jiří Tomeček, Dr. Bureše 3, 370 05 České Budějovice, tel. 602 611 584, tomecek@esperanto.cz (retejo, muzeo)

Kasisto: Vratislav Hirsch, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 603 264 003, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datum-bazo, kontado)

Komitatano: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světlice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Komitatano: Andrea Švubová, Brněnská 3474-32A, 695 01 Hodonín, tel. 604 850 689, a.svubova@email.cz (konferencoj, kongresoj, kunlaboro kun ĈEJ, subvencioj)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Administras: Petr Chrdle.

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Dvořáková

LA 2-A VIRTUALA KONGRESO

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) oficiale malfermiĝis la 17-an de julio. La virtuala kongresejo tamen jam estis alirebla ekde la 16-a de julio: vk.retevent.com (kaj nun la programeroj estas registritaj kaj spekteblaj, novaj aliĝintoj aŭtomate ricevos pasvorton per sia registrita retadreso).

La filmoj *Varsovio cent jarojn poste* (1987) kaj *La centjara Esperanto* (1987), de Roman Dobrzyński, kaj la Nacia Vespero de la 88-a Universala Kongreso (UK) de Gotenburgo (2003) konsistigis la inaŭguran kinejon de la 16-a de julio. La celo estis ebligi al kongresanoj ekscii (aŭ rememori!), kia estas la etoso de ĉeesta UK. Varsovio gastigis la plej grandan UK-on de la historio kaj Gotenburgo proponis modernan nacian vesperon. Aliaj programeroj de tiu ĉi VK ankaŭ omaĝos aliajn UK-ojn.

La Virtuala Movada Foiro (ViMF) inaŭguriĝis la 17-an julio je la 10h UTC (*nia tempo en Ĉeĥio estas UTC+2 horoj*), du horojn antaŭ la kerna programo. La dua parto de la ViMF okazis inter la 18h kaj 20h UTC. Tiel estis dum la tuta kongresa semajno. Pli ol 70 asocioj kaj grupoj aliĝis al ĝi kaj entute estis pli ol 160 virtualaj budoj.

La malfermo de la VK havis salutojn de Duncan Charters, kiu preparolis la kongresan temon “Paco kaj konfido: universalaj valoroj”; de Margaret Zaleski-Zamenhof, kiu salutis el Britio; de Akademio de Esperanto, SAT (kiu ĉi-jare 100-jariĝas), ILEI kaj TEJO; de virinaj reprezentantoj de la 5 kontinentoj anstataŭ la tradiciaj landaj salutadoj; kaj

de la belfasta Loka Kongresa Komitato, kiu atentigis pri la programeroj belfastrilataj de la VK. Sepa kaj Asorti koncertis el Litovio omaĝe al la nuligita 106-a UK. Jam en la unua tago okazis la prelego “Naciaj historioj en Esperantujo: la Gaeloj kaj la Skotoj en Skotlando kaj Irlando” kaj aŭtora momento kun Anna Lowenstein.

Krom tio okazis inaŭguro de la 74-a sesio de la Internacia Kongresa Universitato, de kiu Michele Gazzola estas rektoro, kaj Javier Alcalde faris la enkondukan prelegon de la kongresa temo. (<http://iku2.trovu.com>)



Antaŭ, dum kaj post la kongreso aperas kongresa kuriero **La kolombo de Paco**, redaktara de Anna Striganova kaj Dima Ŝevĉenko (redaktoroj de la revuo *Esperanto*). La numeroj kaj aliaj materialoj estas elŝuteblaj ĉe <https://revuoesperanto.org>.

Speciala momento de la unua tago estis salutletero de Unesko al la 106-a UK/2-a VK. Ĝi estis ricevita vendredon, la 16-an de julio de Mirejo Grosjean, kiu laŭ peto de la Estraro de UEA skribis al Unesko por inviti la ĝeneralan direktorinon de Unesko **Audrey Azoulay** saluti la eventojn. Respondo venis nome de ŝi pere de la vic-ĝenerala direktoro de Unesko, **Prof. Tawfik Jelassi**, kiu bondeziris kaj parolis pri la eventoj, UEA kaj ILEI en tre pozitivaj frazoj. Prof. Jelassi venas el Tunizio kaj eniris sian oficon en julio 2021. La letero venis en la franca.

Salutletero de Unesko

Originalo troviĝas en la Teko de UEA: uea.org/l/teko/agado. Tradukon faris Mirejo Grosjean.



De Sinjoro Tawfik Jelassi, Vic-ĝenerala direktoro de Unesko, respondeculo pri la sektoroj de komunikado kaj informado.

Sinjinorino prezidanto,

Nome de la Ĝenerala Direktorino mi elkore dankas al vi pro via letero, en kiu vi invitas ŝin partopreni en la tutmonda kongreso de Universala Esperanto-Asocio, kiu okazos de la 17-a ĝis la 24-a de julio.

Unesko estas dankema al vi pro tiu invito partopreni en tiu grava jara aranĝo de la Esperanto-komunumo. Tiu evento esprimas trafe la viglecon de UEA, ĝi ankaŭ spegulas ties ĵusajn pozitivajn iniciatojn.

Unesko estas feliĉa kaj fiera labori flanke de UEA ekde jardekoj por antaŭenigi la kulturan kaj lingvan diversecon, same kiel por antaŭenigi la gravecon de tiu diverseco por konstrui kaj fortigi pacon. La publikigo, danke al vi, de la Unesko-Kuriero en Esperanto, pruvas bone la vastecon de niaj samopiniadoj.

Tamen mi bedaŭras, ke mi devas anonci al vi, ke la Ĝenerala Direktorino ne povos partopreni la inaŭguron de 2021 de la Kongreso pro aliaj devoj de longa tempo jam deciditaj.

Mi volas certigi vin, ke Unesko konsideras kun plej alta graveco la laboron faritan de UEA kaj de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), kies prezidanto vi estas. Ĉiuj oficejoj de Unesko staras kompreneble je via

dispono por plani kun vi novajn formojn de kunlaboro ĉirkaŭ niaj komunaj perspektivoj.

Kun ripetitaj dankoj pro via invito, mi petas vin akcepti mian plej altan respekton.

Tawfik Jelassi

NOVA MEMBRO DE LA HONORA PATRONA KOMITATO DE UEA


Dum la fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK), la 24-an de julio 2021, estis anoncita la akcepto de nova membro en la Honora Patrona Komitato de UEA: **Prof. Marco Lucchesi**. La junia revuo Esperanto publikigis intervjuon kun la profesoro.



Marco Americo Lucchesi estas brazila verkisto, profesoro de la Federacia Universitato de Rio-de-Janeiro kaj la nuntempa prezidanto de Brazila Beletristika Akademio, unu el plej respektataj institucioj de Brazilo. Li estis akceptita en tiu akademio en 2011, kaj ekde 2018 li estas ĝia prezidanto. Li havas vastan konon pri pli ol 20 lingvoj kaj eĉ kreis artefaritan lingvon nomatan Laputar, prezentitan per la verko *Bazati dir Härstä Laputar* (“Rudimentoj de la lingvo Laputar”), de 2015. Li havas verkaĵojn kiel poeto, romanisto, memoraĵisto, eseisto, tradukisto kaj eldonisto kaj ricevis multajn gravajn premiojn, ne nur en Brazilo, sed ankaŭ en Eŭropo, aparte en Italio kaj Rumanio, kun kiuj li havas fortajn ligojn. Li estas konata pro sia defendo de indiĝenaj lingvoj kaj homaj rajtoj, kaj sub lia gvido konstante okazas edukaj kaj literaturaj projektoj en malriĉaj kvartaloj kaj en prizonoj.

PREMIO DEGUĈI 2021 AL STEFAN MACGILL

Stefan Clive MacGill naskiĝis la 5-an de oktobro 1948 en Nov-Zelando, tamen ekde 1986 li vivas en Hungario. Stefan lernis Esperanton denaske de sia patro, David MacGill, kiu instigis al sia patrino eklerni la lingvon. Liaj tri filinoj parolas Esperanton; do temas pri kvar-generacia esperantisteco en la familio.



Profesia esperantisto

Stefan studis pri la fako Geografio en Nov-Zelando kaj en 1974 li akiris instruistan diplomon por elementaj lernejoj. En 1976 li translokiĝis al Roterdamo por volontuli en la **Centra Oficejo** (CO) de UEA. De 1977 ĝis 1986 li laboris kiel oficisto, de 1980 ĝis 1984 kiel Direktoro de la CO. De 1976 ĝis 1986 li estis redaktoro de la **Jarlibro** de UEA. Krome, de 1978 ĝis 1986 li ankaŭ estis teknika redaktoro de la revuo **Kontakto**. De 1986 ĝis 1996 kaj denove inter 2000 kaj 2013 li redaktis la gazeton **Juna Amiko**. En 1989 li komencis profesie okupiĝi pri verkado de help-tekstoj por komputilaj programoj; en 2012 li emeritiĝis, sed lia sperto plu speguliĝas en la diversaj gvidiloj, kiujn li daŭre produktas por la Esperanto-movado.

Longjara internacia aganto

Stefan kunfondis la Esperantan Junularan Asocion de Nov-Zelando, en 1964. Li poste prezidis aŭ vic-prezidis tri el la plej grandaj Esperanto-organizaĵoj: en 1977 li fariĝis vicprezidanto kaj sekve, en 1979 kaj 1980, prezidanto de **TEJO**. Lia ĉefa projekto dum 1980 estis la

realigo de la unua seminario de TEJO, kiu ricevis financon kaj organizan subtenon de la Eŭropa Junulara Fonduso (EJF). Post tiam okazis regule multaj dekoj da subtenataj seminarioj, kiuj kune envenigis al TEJO multajn centmilojn da eŭroj. De 1989 ĝis 1992 li estis vicprezidanto de **ILEI**, de 1992 ĝis 1994 li estis kaj denove inter 2009 kaj 2013 prezidanto de ILEI. Elektita en 2013 Vicprezidanto de **UEA**, li estis reelektita en 2016 por dua trijara oficperiodo. Inter januaro kaj marto 2017 li ankaŭ estis provizora redaktoro de la revuo Esperanto. En 2019 li estis elektita komitatano C en la Komitato, posteno, kiun li okupos ĝis aŭgusto 2022.

Nemava verkisto

Krom la riĉa agado kiel aktivulo, Stefan ankaŭ estas verkisto: Sub lia nomo aperis “Tendaraj Tagoj”, “La Laŭta Vekhorloĝo”, “Tridek Roluloj”, “Streĉ’ eĉ, Steĉj-skeĉ’!””, “Pordoj”, “Okulo”, “Nemave Edifi” (FEL, 2007), la teatraĵo “Aŭto-mato” (Beletra Almanako, n-ro 2, 2008) kaj aliaj.

<https://mallonge.net/MacGill>.

Senlaca organizanto

Ekde la ĉesigo de la papera Jarlibro de UEA en 2019, Stefan okupiĝas pri la arigo de informoj, kiun UEA devus transdoni kiel same per la Jarlibro. Li tenas kontaktojn kun ĉiuj landaj kaj fakaj asocioj de UEA kaj landaj sekcioj de ILEI kaj TEJO. La arigo de informoj rezultigis serion de dokumentoj nomatan Landa Parad’, dividitaj laŭ mondopartoj. La aktualaj versioj de tiuj dokumentoj estas en la retejo de UEA Aktivulo.net. Krom tio Stefan ankaŭ agis kiel komisiito pri Aktivula Maturigo (AMO).

Laŭ Gazetaraj informoj de UEA 970

14 AGANTOJ DIPLOMITAJ

En la Fermo de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto (VK) estis anoncitaj 14 ricevantoj de la Diplomoj pri Elstara Agado aŭ pri Elstara Arta Agado

Diplomo pri Elstara Agado:

Petro Baláž, Dorota Rodzianko kaj la teamo de E@I (Slovakio) pro la elstara agado en organizado de aranĝoj kaj projektoj, inter ili KAEST (ekde 2010), SES, SEP, Poliglota Kunveno (ekde 2017), mallonge.net, kaj pro la teknika realigo de diversaj Esperanto-eventoj dum la pandemio, inter ili la Monda Festivalo de Esperanto, VK de UEA, IJK (2020) de TEJO kaj VEKI de ILEI;

Marija Belošević (Kroatio) pro la elstara agado kiel organizanto, ekde 2013, de la Tagoj de Lernado dum la Universala Kongreso kaj, en 2020 kaj en 2021, dum la VK;

Elysée Byelongo (Sud-Afriko) pro la elstara agado kiel unua afrika esperantisto, kies doktoriĝa tezo havas sekcion pri Esperanto, kaj kiel kreinto de E-klubo en Kenjo (Nairobi), Zimbabvo kaj Tanzanio, inter ili la Klubo de Paco kaj Frateco, kadre de kiu li instruis la lingvon al centoj da rifuĝintoj en la Tendaro Nyarugusu, inter 1996 kaj 1998;

Eva Fitzelová kaj Johannes Mueller (Germanio) pro la elstara agado kiel kreintoj kaj prizorgantoj de la podkasto kern.punkto.info;

Irana Esperanto-Asocio (IrEA) pro la elstara agado kiel organizanto kaj gastiganto de multaj retaj eventoj, aparte ekde la komenco de la pandemio, inter ili la 7-a Irana Esperanto-Kongreso (IREK), la unua virtuala kongreso en Esperantujo, en aprilo 2020, kaj la kursaro Tibor Sekelj;

Kolombia Esperanto-Ligo (KEL) pro la elstara agado pri la reta instruado de lingvoj dum la pandemio, inter ili la kursoj pri latinidaj lingvoj per Esperanto kaj du furoraj eldonoj de la Esperanto-kurso por

hispanparolantoj, en 2020 kaj 2021, kun sume pli ol 1000 aliĝintoj;

Luis Obando (Kolombio) pro la elstara agado interalie kiel reviviginto kaj prizorganto de la jutuba kanalo [UEAviva](https://youtube.com/UEAviva) (youtube.com/UEAviva) kaj de la voĉlegita versio de la revuoj Esperanto kaj Monato;

Rafael Lima (Brazilo) pro la elstara agado kiel kreinto kaj prizorganto de la retejo de UEA [UN Esperante](http://UN_Esperante) kaj ĝiaj profiloj en sociaj retoj; (unesperante.wordpress.com)

Suzuki Keiichiro (Japanio) pro la elstara agado kiel plenuminto de 4 periodoj kiel prezidanto de Japana Esperanto-Instituto (JEI), dum 8 jaroj kaj okaze de la 100-jara jubileo de JEI;

Wu Guojiang (Ĉinio) pro la longtempa elstara agado kiel gvidinto de la projekto Ĝemelaj Urboj kaj gvidanto de la Liaoning-a Esperanto-kultura Klubo (LEKK).

Diplomo pri Elstara Arta Agado:

Amir Naor (Israelo), plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj de UEA, pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel verkisto, tradukisto de literaturo kaj kantoj kaj kiel kreinto kaj kunordiganto de la retejo verkoj.com;

Anna Striganova (Rusio) pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel eldonisto, ilustristo, fabel-verkisto, pup-faristo kaj fotisto, interalie pro la lastatempa malavara donaco de multaj el siaj fotoj al Vikimedia; (mallonge.net/striganova)

Eterne Rima (Pollando/Japanio) pro la elstara kontribuo al la muzika E-kulturo kiel pioniro de la esperantista hiphopa kaj repa muziko;

Paulo Sérgio Viana (Brazilo), plurfoje premiita en la Belartaj Konkursoj, pro la elstara kontribuo al la E-kulturo kiel tradukisto, eldonisto, recenzisto kaj kontribuanto de Beletra Almanako kaj Esperanta Retradio.

VEKI 2



Ankaŭ la ĉi-jara ILEI-kongreso por instruistoj okazis virtuale inter la 7-a kaj 15-a de aŭgusto 2021. Ĉefa temo estis: **Esperanto-kulturo en Esperanto-kursoj**. Eblis aŭskulti jenajn prelegojn:

Trarigardo de E-kulturo kaj ĝia apero en instruado. – Kiajn celojn havu instruado de kulturo? – Strukturo kaj gradoj de la instruistaj lertigaj programoj – Lingvo monda en eŭropa saŭco lingva kaj kultura. – E-kulturo en E-kursoj. – E-kulturo en nia edukado. – Unu leciono pri Esperanto por ĉiu lernejo de la mondo. – Instruado de Eo pere de la reto. – La ĉiutaga vivo kiel historio sen timoj kaj psikiatrio. – Muzeo por tuŝi: Arto „videbla“ ankaŭ por blinduloj. – Kiel allogi homojn al Eo. – Kiel efike instrui Eon en Afriko. – Esperanto Sumoo. – E-muzeo en Zaozhuang. – Pri Eo bibliotekoj. – Enkonduko de Eo en lernejojn. – Biblioteko de Massa kun atento al ĝiaj rilatoj kun ILEI. – Kontribuo al E-kulturo traduke kaj sursceneje.

Renato Corsetti atentigis, ke por Azianoj estas Esperanto tre malfacila, ĉar strukturo de iliaj lingvoj estas tute alia ol tiu de lingvoj eŭropaj, al kiuj apartenas ankaŭ Esperanto.



Malgraŭ tio en la ĉina urbo Zhaozhuang troviĝas la plej moderna E-muzeo en la mondo kaj estas konstruata ankoraŭ kelkoble pli granda, kiel montris en sia prelego Bak Giwan. Ni povas ĝoji, ke inter pioniroj de la movado estas videbla ankaŭ niaj Komenio kaj F. V. Lorenz. Vidu filmeton en Jutubo:

[Esperanto Muzeo Zhaozhuang](#)

En la kongreso ne mankis ankaŭ koncerto kaj nacia vespero.

Virtuale okazis ankaŭ kunveno de ILEI-komitato, kien apartenas reprezentantoj de ĉiuj landaj sekcioj.

Nova estraro de ILEI

Virtuala kongreso de ILEI elektis novan estraron: prezidanto



Ahmad Reza MAMDUHI (Irano – vidu foton), sekretario Elena NADIKOVA (Rusio), estrarano pri financoj Karine ARAKELJAN (Armenio), vic-

prezidanto Alessandra MADELLA (Italio), estrarano pri kongresoj Laura BRAZZABENI (Italio), estraranoj Marija JERKOVIĆ (Kroatio), Fernando PITA (Brazilo), Radojica PETROVIĆ (Serbio).

HELPU HELPI 2021

La 18-an de aŭgusto 2021 okazis jam la oka aranĝo de la klubo E-mental' [HELPU HELPI](#), kies celo estas kolekti brikojn por karitata projekto [Briko](#), ekzistanta jam 21 jarojn. Ĝi helpas konstrui labortrejnadcentron por handikapuloj, kiu kreskas rande de Prago. Ĉi-jare kontribuis 27 volontuloj el Ĉeĥio kaj Slovakio kaj oni sukcesis kolekti **entute 6.300,- Kč por 42 brikoj!**



La aĉetitaj brikoj estis ornamitaj per Esperanto-tekstoj kaj enmetitaj en simbolan muron, kiu staras meze de Prago, en la strato, kie ĉiutage trairas turistoj, kiuj admiras la muron kaj fotas ĝin. Kun la muro ili nun ankaŭ fotas la Esperanto-brikojn, kaj tiel oni povos vidi Esperanton en diversaj mondopartoj. Grandan dankon al ĉiuj kontribuintoj!



Vlasta Pištíková

TEJO



Léon Kamenický fariĝis nova prezidanto de la tutmonda junulata esperantistaro. La 25-jara Léon estas slovaka esperantisto, kiu studis en Prago kaj dum kelkaj jaroj estris Ĉeĥan Esperanto-Junularon, partoprenis eĉ niajn ĈEA-kongresojn kiel junulara reprezentanto. Ni ĝojas kaj gratulas.

Vicprezidantoj estas Albert Stalin Garrido kaj Inès Kahin, sekretario Rogier Huurman, kasisto Veronika Venislovas, estraranoj Valentin Ceretto-Bergerat, Matheus Arantes Pacheco, Uriel Gurdián kaj Alexandre Raymond.

Estraro de TEJO decidis akcepti Paweł Fischer-Kotowski kiel la novan redaktoron de Kontakto, organo de TEJO.

Konstrui lingvajn ŝoseojn

Aŭtoj bezonas reton de ŝoseoj kaj ĉiu kultura lingvo „ŝoseojn lingvajn“. Ne gravas, ĉu la lingvon parolas unu miliono da homoj aŭ cent milionoj, sed gravas, ĉu la lingvo havas bone prilaboritajn enciklopediojn, vortarojn, lernolibrojn de ĉiuj lernejoj, beletron propran kaj tradukitan, same pri literaturo faka kaj populare kleriga. Ĉar lingvoj servas ne nur por komunikado, sed ankaŭ por klerigado, kulturo kaj kiel fonto de informoj. Kial la homoj lernu lingvon, kiu estas nur propagandata kaj trudata al aliaj, sed la bazajn lingvajn taskojn ĝi ne plenumas? Progreson de iu ajn lingvo oni juĝas ne laŭ kvanto de parolantoj, sed laŭ kvanto kaj kvalito de ĝiaj „lingvaj ŝoseoj“.

Renkontiĝo en la muzeo

En la tagoj de la 3-a ĝis la 5-a de septembro 2021 Klubo de Esperanto-Amikoj en Svitavy preparis „Renkontiĝon en la muzeo“. En la muzeo kunvenis 34 partoprenantoj el 17 lokoj de ĈR, 1 partoprenanto el Slovakio kaj 1 el Germanio. Interesa programo allogis ankaŭ la publikon de Svitavy.



Vendrede vespere Jan Richtr el la loka klubo rakontis al ni pri sia trisemajna vojaĝo en Naciaj Parkoj de Sudafrika Respubliko. En mallonga video ni povis vidi kiel reagis elefanto, kiam la vizitantoj perdas ĝian plaĉon. Sur centoj da fotografiaĵoj ni vidis la naturon kaj vivon ne nur en dezertoj, sed ankaŭ sur la marbordoj de la Atlantika kaj Hinda oceanoj. Kvankam ĉie en la mondo minacis malsaniĝo per kovimo, li sentis sin tie sekure, ĉar la homoj kondukis discipline kaj ne permesis rompi severajn kontraŭkovimajn regulojn.

Sabate ni bonvenigis eksterlandajn gastojn, tralegis salutmesaĝojn de amikoj el Togo, Japanio, Germanio, Brazilo kaj Ĉinio, per minuto da silento ni honoris memoron de esperantistoj, kiuj nin forlasis por ĉiam en lasta tempo.

Solene ni inaŭguris novan ekspozicion kun temo „Universalaj kongresoj“.



Dum prelego de Libuše Dvořáková ni rememoris ankaŭ kongresojn aranĝatajn de AEH, al kiuj estas dediĉita unu vitrino.



Jindřiška Drahotová prezentis agadon de la klubo en Mladá Boleslav.

La posttagmezan programon malfermis Ján Vajs el Slovakio. Li prilumis por ni la postkulisan laboron, kiam estis preparata kaj okazigata UK 2016 en Nitro. Malgraŭ ĉiuj obstakloj, kiujn la slovakaj esperantistoj devis venki, apartenis la 101-a kongreso al tiuj plej bonaj.



Ili akiris grandan subtenon de la urbo, aŭspicion de la ŝtata prezidento, kaj dum la kongreso mem elsendis la agadon en la tutan mondon kaj vekis intereson ankaŭ ĉe neesperantista publiko.



Vespere danke al rakontado kaj ilustrado per fotoj ni migris kun Ján Vais ĉirkaŭ la mondo. Denove ni konvinkiĝis, ke vojaĝanto nur per propraj okuloj kaj spertoj komprenas, kia estas efektiva vivo en diversaj landoj kaj kiaj homoj tie loĝas.



Okazis lanĉo de nova libro, kiun eldonis KAVA-PECH „Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado“ de Ludwig Boltzmann. La lanĉon partoprenis ankaŭ Profesoro D-ro Renardo Fössmeier el Munkeno, kiu verkis komenton por la libro kaj finance subtenis la eldonon.


Petr Chrdle preparis por ni prelegon „Berta von Suttner, ĉeĥa denaskulino kaj la unua virino, kiu gajnis Nobel-premion pri la Paco“. Berta devenis el la nobela familio Kinský kaj ŝia vivo ne estis facila.



Dimanĉe niaj gastoj ĉeestis la kermeson en Svitavy, trarigardis la urbon kaj vizitis memorindaĵojn. Kun ĝojo ni atendas novajn renkontiĝojn en la muzeo.

Libuše Dvořáková

Regiono Mladá Boleslav Forgesitaj historietoj



Aŭtomobilfabriko Škoda, slange Škodovka, alvokis civitanojn de la urbo Mladá Boleslav, ke ili priskribu historietojn kaj rakontojn, kiuj povus esti forgesitaj, poste oni faris la 8-an de septembro 2021 inaŭguron en tre kaduka metiejo kun paneloj pri 25 rakontoj.

Ni vidas tie temojn kiel *Anĝela kahelo*, *El la memorlibro*, *Leninmonumento*, *Rakontoj el Kosmonosy*, *Mladá Boleslav 1945*, *Dekliva ŝoviĝo de la tereno*,

Velocipedo ktp.



Klubanoj J. Drahotová kaj J. Čečetka

Inter ili ankaŭ panelo **Esperanto a Mladá Boleslav**, kiun prilaboris Jindřiška Drahotová kun Miroslav Vaněk. Kroma rezulto de ilia laboro, rezulto multe pli grava kaj daŭra, estas, ke ili kreis kronikon de Esperantomovado en la regiono.

Antonín Dvořák

1841-1904



La 8-an de septembro 2021 la kultura mondo rememoris 180-jaran datrevenon de la naskiĝo de nia granda komponisto Antonín Dvořák. Ekzemple la televida kanalo Mezzo elsendis tre modernan version de Najado en nuntempaj vestoj.

Ni povas fieri, ke ankaŭ en Esperanto ni havas **Najadon** en sonregistro de Verda Stacio el aprilo 1950. Tradukis Tomáš Pumpr, kantis Maria Tauberová, Beno Blachut, Karel Kalač, kaj komenton legis Karel Höger. Unua versio estis elsendita jam oktobre 1938 kun aliaj kantistoj (Alexandra Čvanová, Josef Válka, Leonid Pribytkov).

Ekzistas ankaŭ **Jakobeno** en Esperanta traduko de Jiří Kořínek, kiu plie esperantigis kelkajn el **Bibliaj Kantoj**, **Ciganaj melodioj**, **Ho Granda Dio**, **Kiam patrino kanti lernigis min**, **Ringo** el Moraviaj Duetoj. Rudolf Hromada tradukis **En multaj koroj regas mort'**.

La tekstoj konserviĝis, same ankaŭ du kazedoj kun sonregistro de Najado.

Miroslav Malovec

SOMERA ESPERANTUMADO EN SUDA BOHEMIO

Post longa kovim-paŭzo somere estis denova okazo por almenaŭ kameretosaj personaj renkontoj, precipe kadre de kulturaj aranĝoj en Písek kaj ĉirkaŭaĵo. En la [videokanalo de la klubo La Ponto](#) aperis 6 novaj videoj el ilia programo (*Folkloro Festivalo, Urba Solenaĵo, Orplacerumado**, *Semajn-fino de Ŝvejk* k.a.).



La klubo ekde 2013 alŝutis 100 videojn kaj al pli ol 30 000 spektintoj nerekte reklamis ankaŭ Esperanton. Revigliĝis ankaŭ korespondkontaktoj kun eksterlando.

Solenaĵo okaze de 180-jariĝo de la Urba biblioteko en Písek estis okazo por tosto je bela vivjubileo de la klubano d-ro Jiří Šmidák kaj por aktualigo de la Esperanta versio de la biblioteka retejo, kiu estos espereble baldaŭ alŝutota.



En la [Torf-mikroregiono de Veselí](#)

* placero = sabla loko enhavanta grajnoj de oro, placorado = akirado de la grajnoj per lavado

oni migris ĉirkaŭ la fiŝlagoj Espero, Kredo kaj Amo.

Jarka Malá realigis 8 novajn programojn por la [Esperanta Retradio](#). En julio ŝi gastigis M. Fejfičová, kun kiu ŝi gvidis lingvokurson kadre de SES. Ŝi kaj Vladimír Türk daŭrigis ankaŭ sonregistradon de artikoloj el *La Revuo Esperanto* kaj *Monato*. V. Türk ekde marto ĝis aŭgusto skanis por ĈEA du skatolojn (po 12 kg) de la arkivo de doc. Werner kaj lingve kontrolis ĉ. 60 originajn fabelojn de Fratoj Grimm en traduko de H. Kaiser.

En julio esperantistoj renkontiĝis ankaŭ kadre de la *Teatra Somero* en Kratochvíle. La klubo E-mental' organizis fine de junio tradician amuzan lud- kaj rostaranĝon *VIANDO* en Chotýčany kaj en aŭgusto renkontiĝon en České Budějovice.

Pavla Dvořáková realigis 26.7. retprelegon *Surspure de Zamenhof en Varsovio II*, pretigis akompanan virtualan fotokolekton "[Universalaj Kongresoj sur kolektmaterialoj](#)" (akompane al inaŭguro de la nova muzea ekspozicio) kaj preparis muzikan programon por la Kluba solenaĵo en Brno. La kantoj estos baldaŭ disponigitaj en interreto.

Do eĉ en tiu ĉi nefacila periodo kaj malgraŭ maldensiĝo de la membraro la aktiveco ne tute estingiĝis. Espereble oni trovos novan spiron kaj inspiron kaj interesitojn por novaj agaderoj.

Pavla Dvořáková

Lančov ĉi-jare

Estis du etapoj, sed nur en la dua okazis kurso de Esperanto kun kvar gelernantoj (en aĝo de 9, 17, 19 kaj 28 jaroj), gvidis M. Malovec.



Post la dua etapo venis eksaj tendaranoj jam por la 24-a renkontiĝo. La ĉefa programo estis sabata ekskurso al burgo-ruino Cornštejn, kun akompano de juna ĉiĉeronino.



Pac-konferenco en Bratislava

La 21-an de septembro 2021

La konferencon kunvokis neesperantista societo *Zjednotení za mier* (Unuiĝo por la paco), tamen en ĝia programo aperas **subteno de Esperanto** kiel la lingvo de la paco.

Membro de la societo povas fariĝi ĉiu homo aŭ organizo kun pozitiva sinteno al porpacaj aktivecoj. Aliĝu ĉe:

ikompisova@gmail.com

Programo de la konferenco:

- Enkonduka parolado de la eksa slovak prezidento Ivan Gašparovič
 - Novaj celoj de la pacmovado (*Eduard Chmelár*)
 - EU kiel porpaca aktivisto? Kion fari por subteni pacmovadon (*Ilona Švihlíková*)
 - Rajto por la paco kaj ebloj de ĝia esprimiĝo en jura sistemo (*Branislav Fábry*)
 - Ni bezonas novan sekurecan arkitekturon ampleksantan ankaŭ ŝtatojn nomatajn malamikaj akorde kun Pariza Ĉarto por nova Eŭropo (*Ján Čarnogurský*)
 - Eksterlanda politiko en la sfero de homaj rajtoj: hipokriteco de liberala imperiismo (*Petr Drulák*)
 - Historia sperto pro landa okupacio: daŭra ĉeesto de fremdaj trupoj sur teritorio de Slovaka Respubliko estas nedezirata (*Svetozár Nad'ovič*)
- En sia Statuto la societo mencias Esperanton en artikolo 2 (Celoj de la societo), punkto L.

<http://www.zjednotenizamier.sk>

UEA SURVOJE AL FINANCA RESANIGO

La 14-an de aŭgusto 2021 la Komitato de UEA kunside diskutis agadplanon de la Estraro por daŭrigi la financon resanigon de la Asocio. La agadplano spegulas instrukciojn donitajn de la Komitato al la Estraro pasintjare, surbaze de rekomendoj de la Komisiono pri Financo kaj interkonsiliĝe kun la Ĝenerala Direktoro. La raporto pri la agadplano estas publike alirebla sub la nomo [Raporto pri financa resanigo \(2021-08-16\)](#).

Ĉiuj dokumentoj por la financa resanigo troviĝas en la komitata elŝutejo kaj konsistas el raportoj kaj protokoloj de la Komitato, komitataj laborgrupoj, Komisiono pri Financo, Estraro kaj Ĝenerala Direktoro. Esence la dokumentoj konsciigas, ke bedaŭrinde UEA estas strukture deficitata.

Surbaze de tiu kompreno la Komitato en 2020 subtenis la rekomendojn, ke pli da laborfortoj laboru ekster Nederlando, samtempe kun esploroj por la estonteco de la Biblioteko Hector Hodler (BHH) kaj translokiĝo de la Libroservo. Aldone estis rekomendoj por ludoni la sidejan domon, daŭrigi la administran modernigon (nuntempe faratan kadre de la sistemo AKSO.org) kaj konstrui strategiojn por investado kaj subvencipetado.

En tiu direkto, por la dezirataj daŭripovigo kaj progresigo de UEA, la raporto pri la agadplano, resume, traktas pri: (1) agado por subvencipetado, ĉe malsamaj subvencionantoj aŭ programoj kaj kunlabore kun diversaj partneroj, i.a. kontrakte kun la profesia entreprenado Kosmo Strategio kaj kun engaĝiĝo

de landaj kaj fakaj asocioj (momente nur de Eŭropo); (2) laboroj kaj vizio de la Estraro kaj Ĝenerala Direktoro pri investado, inkluzivante la bezonon ŝanĝi la risiko-profilon de UEA kaj la akiron de konsilado de sperta esperantista profesiulo pri investado; (3) movo de du laborfakoj (Kongresa Fako kaj Libroservo) el la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo al stabo en Slovakio, en nova funkcia strukturo: kontraktante kun la teamo de Edukado@Interreto (E@I) por plenumo de la laborfakaj taskoj, kun signifa redukto de la administraj kostoj kaj strategia uzo de aliaj eventoj por akceli vendojn de libroj; (4) laŭkontrakta transdono de la Arĥivo de UEA kaj parto (neduoblaĵoj) de la kolekto de BHH al la Internacia Esperanto-Muzeo en Vieno (IEMW), por profesia prizorgado fare de la Aŭstria Nacia Biblioteko; (5) kaj fine vendo de la oficeja domo en Roterdamo kiel alternativo al ludono, laŭ ricevita aĉetpropono de 1 075 000 EUR, favora al UEA laŭ analizo de sendependaj profesiaj makleristoj.

Specife pri la vendo de la nuna sideja domo la Komitato ankoraŭ devas diskuti, analizi kaj decidi. La vendo konsiderindas kiel alternativo, ĉar la domo postulas ampleksan multekostan renovigon antaŭ ol disponeblo por ludonado. Ĉiel ajn la disponigo de la sideja domo ne signifas movi la sidejon de UEA el Roterdamo. UEA posedas alian konstruaĵon en la sama strato de la CO, nome la Volontula Domo (VolDom), kies teretaĝo estas uzebla por oficejo kaj povas fariĝi la nova oficeja adreso de la Asocio. La VolDom estas profitodona al UEA kaj la rekomendo estas ĝin plu posedi.

laŭ Gazetaraj Komunikoj de UEA n-ro 977

Slovosled v esperantu

I když má esperanto volný slovosled, změna pořadí slov mění částečně i význam. Na začátku věty stojí známá skutečnost, kdežto na konci věty skutečnost nová, na které proto leží důraz a která je odpovědí na pomyslnou otázku. Porovnejme:

La libro kuŝas sur la tablo.

Sur la tablo kuŝas libro.

První věta odpovídá na otázku *Kie kuŝas la libro?*, protože se vědělo o knize, ale nevědělo se, kde se nachází. Druhá věta odpovídá na otázku *Kio kuŝas sur la tablo?*, protože v tomto případě se vědělo o stolu, ale nevědělo se, co na něm leží. Všimněte si, že *libro* je stále podmětem věty v prvním pádě, i když stojí za slovesem, nemůže mít tedy akuzativní koncovku -n (Ne: sur la tablo kuŝas libron).

Petro pentris la bildon.

La bildon pentris Petro.

První věta odpovídá na otázku *Kion faris Petro?*, druhá *Kiu pentris la bildon?* V některých jazycích nemůže být 4. pád na začátku věty, proto si pomáhají trpným rodem nebo vedlejší větou, což je možné použít i v esperantu:

La bildo estas pentrita de Petro.

Estis Petro, kiu pentris la bildon.

V některých případech může být vedlejší věta chápána dvěma způsoby:

Estas homoj, kiuj ŝtelas.

To lze chápat tak, že existují někteří lidé, kteří kradou, nebo že jsou to lidé, kdo krade, nikoliv zvířata.

Všimněte si, jak se změnou slovosledu změní důraz a tím i významový odstín:

Mi volonte plenumis lian deziron.
(Kion mi plenumis?)

Lian deziron mi plenumis volonte.
(Kiel mi plenumis?)

Lian deziron volonte plenumis mi.
(Kiu plenumis?)

Lian deziron mi volonte plenumis.
(Kion mi faris kun lia deziro?).

Mi volonte plenumis deziron lian.
(Kies deziron?)

Některá slůvka (*nur, ankaŭ*) zdůrazňují slovo, před kterým stojí:

Peĉjo manĝas nur viandon. (nenion alian)

Nur Peĉjo manĝas viandon. (neniu alia)

Peĉjo viandon nur manĝas. (ne kuiras, ne prilaboras)

Peĉjo manĝas ankaŭ viandon. (Péťa jí i maso. Péťa jí také maso.)

Ankaŭ Peĉjo manĝas viandon. (I Péťa jí maso. Také Péťa jí maso.)

Peĉjo viandon ankaŭ manĝas. (Péťa maso i jí. Péťa maso také jí – nejen připravuje.)

Naše *také* ovšem tuto zásadu většinou nedodrží a tím české esperantisty mate (Péťa jí maso také). Když *také* nahradíte slůvkem *i*, poznáte, kam patří esperantské *ankaŭ*. Nelze říci *Péťa jí maso i*, nýbrž pouze *I Péťa jí maso*, takže vidíme, že v esperantu je správná věta **Ankaŭ Peĉjo manĝas viandon**. V praxi se ovšem potkáváme také s variantou **Peĉjo manĝas viandon ankaŭ**, ale není vhodná, protože zahraniční esperantista pak neví, ke kterému slovu *ankaŭ* vztáhnout.

Musíme počítat s tím, že v jazycích jsou různé zvyklosti a že naši formulaci může jinojazyčný esperantista chápat jinak.

Volně podle Informoj de Akademio 34

Denove sur Ĉantorio

Jen kelkaj vortoj kaj fotoj pri la montara renkontiĝo, kiun mi ĵus partoprenis. Ĉu ni kune partoprenu ĝin venontfoje? Se la ideo plaĉas al vi, bonvolu noti tion en via kalendaro kaj sciigi viajn geamikojn pri tiu ebleco.



Kiel kutime, dum la tria dimanĉo de junio (20.06.2021), post unujara paŭzo pro la pandemio de la kronvira malsano, okazis la tradicia renkontiĝo de esperantistoj sur la pinto "Ĉantorio La Granda" (Velká Ĉantoryje, Czantoria Wielka) en Beskidy-montaro.



Denove estis bela, sunplena vetero. La renkontiĝon partoprenis sume ĉirkaŭ 30 samideanoj, kiuj venis el Slovakio, Ĉeĥio kaj Pollando. Mi el Krakovo kaj la samideano Maciek el Zakopane (apud Tatry-montaro) venis jam sabate, unue al la montara urbeto Wisła, ĉe kiu estas fontoj de la samnoma rivero, fluanta tra la tuta Pollando, interalie tra Krakovo, al la Balta Maro.



Ni supreniris la pinton "La Granda Konuso" (Velký Stožek, Stožek Wielki), ĉe la ĉeĥa-pola landlimo, de kiu estas bona videbleco. Sciindas, ke ĉe la pinto funkcias montara rifuĝejo, kiu venontjare festos sian 100-jaran jubileon. Inter turistoj, kiujn ni renkontis tie, estis multaj knabinoj, kies kapoj estis dekoritaj per florkronoj. Ili intencis partopreni ĉi-semajnfina noktan vagadon tra la montaro kaj festadon okaze de baldaŭa nokto de la Sankta Johano, la plej mallonga en la tuta jaro.

Vidante survoje la foliojn de filiko mi estis scivolema ĉu iu provos trovi ĝian floron, kiu, laŭ la mito, floras unufoje jare, dum la somera solstico, kaj provizas al ĝia trovinto la riĉecon kaj abundon.



Dimanĉe, ekde la frua mateno ni vagadis tra aliaj pintoj, interalie tra Soŝovo, ĝuante belan naturon. En la montaro situas la naturprotektata aero de Natura 2000 "La Silezia Beskido" kaj la Naturezervejo de Ĉantorio. Ni ricevis bongustan matenmanĝon ĉe la pinto Cieŝlar, nomata tiel de la familia nomo de la lokaj montaranoj, kaj vagadis tra pintoj, kovritaj de arbaro kaj herbejoj. Post la longa marŝado, ni finfine ekvidis la turon sur la pinto de Ĉantorio, kaj antaŭtagmeze ni atingis la ĉeĥan gastejon, kie estis okazanta la renkontiĝo.

Ni babilis kun partoprenintoj, gustumis bongustan malvarman bieron aŭ aliajn trinkaĵojn kaj lokajn pladojn. Kelkaj partoprenintoj aĉetis originalajn maskojn, bele desegnitajn kun Esperanto-simboloj, kiuj limigas disvastigon de la virusa infekto, pro-

duktataj de slovakaj esperantistoj kaj al la pinto kunportitaj de la pola samideano Aleksander.


Okazis interalie prezentado de fotoj kaj konkurso pri arboj, kiujn oni lernis rekoni laŭ la folioj, floroj, fruktoj, trunkoŝelo kaj aliaj trajtoj. Partoprenantoj, kiuj sukcesis trovi bonajn solvojn, ricevis kelkajn lastatempe eldonitajn numerojn de E-revuo kaj bombonojn, pakitaj en la verda papero, kiel premio.

Kune kun la ĉeĥa samideano Ladislav el Pardubice, kun kiu mi iam konatiĝis vintre, dum la renkontiĝo de montaraj vojaĝantoj apud Poludnica, kiu sabate ankaŭ venis al la pinto Granda Konuso, kaj kun aliaj partoprenintoj, ni ĝuis noveldonitan bildan ludon pri birdoj, dum kiu oni lernis iliajn nomojn en diversaj lingvoj.



La renkontiĝon ĉeestis multaj samideaninoj, interalie Renata kaj Jana el Slovakio, Libuše, Jana, Vlasta, Dana, Anna, Li el Ĉeĥio, Kasia kaj Wiesława el Pollando sed kelkaj foriris pli frue, verŝajne por esplori aliajn vizitindajn lokojn ĉe la monto.

Plaĉis al mi tiu ĉi montara renkontiĝo kaj mi esperas ĝui la alian kun ebleco esplori la najbaran regionon helpe de slovakaj kaj ĉeĥaj samideanoj. Mi denove konatiĝis kun novaj samideanoj kaj mi estas kontenta pro la etoso de la renkontiĝo kaj ebleco vagadi tra montaro,, ĉar ĝi donas al mi novajn fortojn kaj certigas sanon.



Kune kun la ĉeĥa samideano Zdenek, kiu ŝatas bicikli, kaj kun aliaj partoprenintoj, ni pridiskutis eblecon esplori najbaran montaran regionon,

ekzemple supreniri aŭ veni per telfero al la pinto Javorový, apud Oldřichovice, kaj poste, tra la urbo Třinec aŭ Nýdek, veni al Ĉantorio, kio povus okazi venontjare. Aŭ unu tagon antaŭ la ĉefa, dimanĉa renkontiĝo ni povus kune viziti la proksiman lokon Trojstyk, kie najbaras tri landlimoj de Slovakio, Ĉeĥio kaj Pollando, esplori vizitindajn lokojn kaj tranokti ie tie. Ĉu vi ŝatus veni tien ankaŭ, se ni organizos plurtagan eventon?

Dum la renkontigo oni ĉiam prezentas diversajn programerojn kaj ni havas kelkajn ideojn pri novaj amuziĝoj, sed ni ĝojos, se vi ankaŭ povus kontribui kaj proponi iun programeron venontfoje.

Por konvene rigardi kelkajn fotojn pri la ĉi-jara renkontiĝo sur Ĉantorio iru al: <https://tinyurl.com/zuyzatkg>

Eksterlandaj gastoj al ni revenas

Dum ferioj nin denove vizitis familio el Svedio. Eble vi rememoros ilin danke al mallonga filma riporto el KELI-kongreso (esperantistaj kristanoj) en 2013, kiun registris loka kabla televido.



La familio kaj ilia avino

Bengt Olof Åradsson (denaska svedo), lia edzino Ágnes Ráczkevy-Eötvös (denaska hungarino) kaj ilia filo André Åradsson vizitis denove Esperanto-Muzeon en Svitavy dum sia vojaĝo el la pola urbo Legnica al Budapeŝto.

Ĉe tiu okazo ili donacis al la muzeo librojn kaj propagandajn materialojn. Kelkajn el ili vi povos vidi en nova eskpozicio inaŭgurita sabate la 4-an de septembro 2021.

Plejparto de la materialoj estas donaco post ilia avino Éva Farkas-Tatár (1924-2018), konata hungara esperantistino.

Dankon al ĉiuj donacintoj ni sendas per ĉi tiu artikoleto en la asocia organo Starto, kiun ni sendas ankaŭ eksterlanden.

Libuše Dvořáková

Ekskurso tra ĉirkaŭaĵo de Česká Lípa

Pasintjare membroj de nia klubo el Svitavy ekskursis tra ĉirkaŭaĵo de Nymburk, ĉi-jare ni veturis pli okcidenten. Tranoktadon ni prizorgis en Česká Lípa. La 5-taga programo estis riĉa.

Lunde ni vizitis – danke al afableco de direktorino de Kulturcentro Doksy sinjorino doktorino Renata Mauserová – Memorejon K. H. Mácha kaj Kastelon de Doksy malgraŭ la ferma tago.



La mardan antaŭtagmezon ni dediĉis al vitrofarejo de s-ro Pačinek en Kunratice u Cvikova. Ni komencis per trarigardo de la preĝejo Laŭdego de la Sankta Kruco, kiun s-ro Pačinek luis kaj ekspozicias tie siajn produktojn inkluzive de vitraj koronavirusoj, kiujn li faris por sanitaristoj de Liberec-regiono. Ni sekvis la laboron de vitrofaristoj ĉe la fornoj eĉ dum varmega vetero. Ili meritas nian admiron.

En la supra etaĝo de la objekto estas ekspoziciejo. Troviĝas tie interalie ankaŭ kopio de vazo, kiun la lokaj vitrofaristoj fabrikis por reĝidino el Butano kaj ŝi observis ilin dum laboro. La posedantojn de la vitrofarejo ĝojigis ankaŭ nia klubanino Li Huang, kiu legis kaj tradukis la nomon de ĉina vitrofaristo, kiu vizitis la vitrofarejon kaj donacis vazon kun sia subskribo. La ĝardeno ornamita per vitraj figuretoj estas unika. Nia vojo kondukis nin al Inferaj Minejoj

(Pekelné doly) kun grotoj Dezertaj Preĝejoj (Pusté kostely). Posttagmeze ni trarigardis rokan burĝon en Sloup v Čechách, vizitis arbaran teatron sur la kontraŭa deklivo kaj la plej fortikaj direktis sin al belvidejo *Na stráži* (Gardejo).



Merkrede ni vizitis Nový Bor, Česká Kamenice kun pilgrima kapelo Naskiĝo de Virgulino Maria kaj preĝejo de Sankta Jakobo, kelkaj entreprenis vojon al belvidejo sur Kastela Supro (Zámecký vrch). En Kamenický Šenov ni vizitis Muzeon de Vitro kun ekspozicio dediĉita ankaŭ al plej antikva vitrofarista lernejo. Ni ne forgesis halti ĉe *Panská skála* (Sinjora roko). Ĵaŭde ni tramigris belan natur-rezervejon *Peklo* (Infero) kun roka urbo kaj interesa fervoja viadukto. Ĉe la komenco de la itinero troviĝas kastelo Zahrádky (Ĝardenetoj), sed ni vizitis kastelon Zákupy. Ni ne evitis akvan burĝon en Česká Lípa. Vojaĝante hejmen ni ĝuis promenon tra Roudnice nad Labem kaj tra Mělník kun kunfluejo de Elbo kaj Vultavo. La ekskurson ni avide travivis kaj restis belaj memoroj.

Libuše Dvořáková

Základní rozdíly ve vyjadřování v češtině a v esperantu

1. Číslovky

Slovanské jazyky mají zvláštnost, že po číslovkách od 5 výše používají 2. pád (*tři bratři, čtyři bratři – pět bratrů, šest bratrů ... sto bratrů* atd.), ale v jiných jazycích k tomu není důvod, nelze tak překládat ani do esperanta. Esperanto říká doslova: *tři bratři, čtyři bratři, pět bratři, šest bratři ... sto bratři* atd.: *tri fratoj, kvar fratoj, kvin fratoj, ses fratoj, cent fratoj*. Nikoliv tedy: *ses da fratoj*.

2. První a čtvrtý pád

Mnoha lidem dělá potíž poznat v české větě 4. pád, protože v češtině jen některá podstatná jména mají 4. pád odlišný od prvního: *pán – vidím pána*, ale: *hrad – vidím hrad*.

Podmět v 1. pádě stojí obvykle před slovesem a předmět ve 4. pádě až za slovesem (*otec koupil psa*), ale podle postavení ve větě nelze pády rozlišovat, protože mohou mít postavení přehozené (*psa koupil otec*). U slov se stejným tvarem v obou pádech může dojít k nejasnostem (*auto táhne traktor, traktor táhne auto – kdo koho táhne?*). Esperanto oba pády přísně rozlišuje (*aŭto tiras traktoron – aŭton tiras traktoro*). Je jasné, který stroj táhne a který je tažen, i když je běžný slovosled přehozen.

Ve 4. pádě může být nejen předmět, ale i příslovečné určení: *je to míli daleko, budu tam hodinu, stojí to korunu, měří jednu stopu*. V češtině se to obvykle nepozná, protože většina měrných jednotek má ve 4. pádě stejný tvar jako v prvním: *je to kilometr daleko, budu*

tam den, stojí to dolar, měří jeden metr. Avšak esperanto i v tomto případě 4. pád přísně dodržuje: *ĝi estas unu kilometron malproksime, mi estos tie unu tagon, ĝi kostas unu dolaron, ĝi longas unu metron*.

Pokud si nejste jisti, zkuste nahradit český výraz, který má oba pády stejné, výrazem podobného významu, který má ale odlišné tvary: *půjdu celý den – půjdu celou hodinu*. Vidíme, že *celou hodinu* je 4. pád, musí být tedy ve 4. pádě i *celý den* (*mi iros tutan horon – mi iros tutan tagon*).

Některým lidem dělá potíž poznat podmět věty v 1. pádě, když stojí až za slovesem: *na stole leží sešit – sur la tablo kuŝas kajero* (ne: *kajeron*).

Zvláště je mate, když významově je důležitější osoba, která stojí navíc na prvním místě, ale mluvnicky ve větě vystupuje ve funkci předmětu: *Petra zajímá hudba, Petrovi se líbí obrazy, Petrovi stačí kus chleba. – Petron interesas muziko. Al Petro plaĉas pentraĵoj. Al Petro sufiĉas peco da pano*. V těchto větách podměty tvoří slova *hudba, obrazy, kus*, kdežto Petr je předmětem (jednou ve 4. pádě, dvakrát v 3. pádě).

Poznámka 1: Všimněte si, že zatímco v češtině říkáme *stojí to korunu*, v esperantu je lépe říci *stojí to jednu korunu*.

Poznámka 2: Sloveso *mezuri* znamená zjišťovat míru (*mi mezuras la stangon – měřím tu tyč*), kdežto mít míru vyjadřujeme jinými způsoby (*tyč měří dva metry – la stango longas du metrojn, la stango havas longon de du metroj*).

3. Podmět a sloveso

Po vzoru angličtiny používá esperanto ve všech osobách stejný slovesný tvar (*mi telefonas – telefonuji, vi telefonas – telefonuješ ... atd.*), proto musí být u slovesa vždy podmět. Pokud tím podmětem není podstatné jméno (*Pavel telefonuje, rodiče telefonují*) nebo jiné slovo (*mladí telefonují, každý telefonuje, všichni telefonují, kdo telefonuje, někdo telefonuje, nikdo netelefonuje*), pak musí stát u slovesa osobní zájmeno. Nestačí tedy říci jako v češtině pouze *sedím, pracuješ, budeme zpívat, přišli jste, koupili by, řekla*, nýbrž vždy důsledně *já sedím, ty pracuješ, my budeme zpívat, vy jste přišli, oni by koupili, ona řekla – mi sidas, vi laboras, ni kantos, vi venis, ili aĉetus, ŝi diris*.

4. Zápor

Zápor se v esperantské větě vyjádří vždy jen jednou. Místo našeho *nikdo nepřišel, nic nemám, nikam nechod', nikdy nechodím pozdě, nikomu nic neříkej* řekne se v esperantu doslova: *nikdo přišel, já mám nic, jdi nikam, já nikdy chodím pozdě, nikomu řekni něco – neni venis, mi havas nenion, iru nenien, mi neni venas malfrue, al neni diru ion*.

5. Otázka

Otázky existují zjišťovací a doplňovací. Na zjišťovací se odpovídá ANO – NE (*Půjdeš se koupat? – Ano, půjdu. Ne, nepůjdu.*), kdežto na doplňovací otázku takto odpovědět nelze, musí být však doplněna další informací (*Kam se jdeš koupat? – Jdu se koupat na přehradu.*). Doplňovací otázky vždy začínají nějakým tázacím slůvkem (*co, jaký, kdo, čím, kde, kam, kdy, proč, jak, kolik*), kdežto zjišťovací se vyjadřují jen

intonací (melodií hlasu), výjimečně slůvkem "zda, zdalipak" (*Zdalipak se půjdeš koupat?*). Tak je tomu v češtině. V esperantu je to stejné pouze s otázkami doplňovacími, kdežto otázky zjišťovací vždy začínají slůvkem ĈU (= zda). České otázky *mají také?, napíšeš ten dopis?, půjdeme do kina?, dáme si čokoládu?* nutno vyjádřit doslova: *zda také oni mají?, zda ty napíšeš ten dopis?, zda my půjdeme do kina?, zda my si dáme čokoládu? – ĉu ankaŭ ili havas?, ĉu vi skribos la leteron?, ĉu ni iros al kinejo?, ĉu ni prenos ĉokoladon?*

6. Minulý čas

V minulém čase používá čeština tvary pomocného slovesa BÝT spolu s minulým přičestím: přišel jsem, viděl jsi, koupili jme, dali jste (pouze ve třetích osobách je jen minulé přičestí: přišel, viděla, koupili, dali). Toto pomocné sloveso zde nemá svůj vlastní význam (být, existovat), proto se do esperanta nepřekládá. Navíc esperanto rozlišuje rod a číslo pouze podmětem, přičestí minulé je samo neměnné (vždy má koncovku -is): *mi venis – přišel jsem, přišla jsem* (doslova: *já přišel, já přišla*), *vi venis – přišel jsi, přišla jsi* (doslova: *ty přišel, ty přišla*), *ŝi venis – ona přišla, ili venis – oni přišli, ony přišly* atd.

7. Budoucí čas

Čeština má slovesa nedokonavá, která vyjadřují děj nedokončený, probíhající (*kupovat, dělat, zpívat, číst*), a slovesa dokonavá, která vyjadřují děj dokončený (*koupit, udělat, zazpívat, přečíst*). Když řekne někdo *četl jsem knihu*, není jasné, zda ji dočetl, kdežto když řekne *přečetl jsem knihu*, znamená to, že ji skutečně dočetl.

Nedokonavá slovesa mají čas minulý, přítomný i budoucí, kdežto dokonavá slovesa pouze minulý a budoucí (protože přítomný děj ještě nemůže být ukončený). Porovnejte:

	nedokonavé	dokonavé
minulost	<i>četl</i>	<i>přečetl</i>
přítomnost	<i>čte</i>	-
budoucnost	<i>bude číst</i>	<i>přečte</i>

Nedokonavé sloveso má budoucí čas složený (*bude číst*), dokonavé sloveso jednoduchý (*přečtu*), který si někteří lidé pletou s přítomným časem (vlastně je to tvar přítomného času, ale ve funkci času budoucího).

U některých nedokonavých sloves vyjadřujících pohyb se budoucí čas tvoří předponami *po-*, *pů-* a je také jednoduchý:

minulost	<i>letěl šel</i>	<i>běžel plaval</i>
přítomnost	<i>letí jde</i>	<i>běží plave</i>
budoucnost	<i>poletí půjde</i>	<i>poběží poplave</i>

Jednoduchý slovesný tvar nemusí být tedy vždy přítomný čas!!!

Esperantské sloveso vyjadřuje pouze druh činnosti, kdežto ukončenost nebo neukončenost děje se vyznačí jinými prostředky. Budoucí čas má v esperantu vždy jednoduchý tvar (koncovkou *-os*), který odpovídá oběma našim tvarům, tedy dokonavému i nedokonavému: *mi legos = přečtu, budu číst*.

Je tedy nesprávné překládat náš složený budoucí čas doslova: *budu pracovat = mi estos labori* (správně: *mi laboros*).

8. Příčestí a přechodníky

Příčestí dělíme na činná (*píšící, napsavší*) a trpná (*psaný, napsaný*). Dále na přítomná (*píšící – psaný*), která se v češtině tvoří z nedokonavých sloves, protože vyjadřují děj probíhající, a na

minulá (*napsavší – napsaný*), která se tvoří z dokonavých sloves, protože vyjadřují děj ukončený. V češtině se činná příčestí používají málo, minulá skoro vůbec ne, zato v esperantu jsou dost častá. Esperanto má navíc i příčestí budoucí, která se do češtiny překládají opisem (*hodlající psát, hodlající napsat, mající být psán, mající být napsán*).

Podobné dělení je i u přechodníků, které vyjadřují děj doprovázející děj hlavní (*pracujíc zpívala*). Esperanto používá přechodníky velmi často, čeština už téměř vůbec ne, proto velmi poklesla jejich znalost. Lidé ztratili především cit pro rod i číslo. V češtině má každý přechodník tři tvary: první platí pro rod mužský, druhý pro rod ženský a střední, třetí je společný pro množné číslo všech rodů. V esperantu těmto třem tvarům odpovídá tvar jeden.

Český přítomný přechodník má koncovky *-e, -íc, -íce* nebo *-a, -ouc, -ouce*:

on	ona, ono	oni, ony, ona
<i>píše</i>	<i>píšíc</i>	<i>píšíce</i>
<i>dělaje</i>	<i>dělajíc</i>	<i>dělajíce</i>
<i>bera</i>	<i>berouc</i>	<i>berouce</i>
<i>jda</i>	<i>jdouc</i>	<i>jdouce</i>

Český minulý přechodník má koncovky *-(v), -(v)ší, -(v)še*:

on	ona, ono	oni, ony, ona
<i>napsav</i>	<i>napsavší</i>	<i>napsavše</i>
<i>vzav</i>	<i>vzavši</i>	<i>vzavše</i>
<i>vynes</i>	<i>vynesši</i>	<i>vynesše</i>

Ostatní esperantské přechodníky vyjadřuje čeština opisem: *hodlaje, hodlajíc, hodlajíce psát; jsa psán, jsouc psána, jsouc psáno, jsouce psány; maje být napsán, majíc být napsána, majíc být napsáno, majíce být napsány*.

PRAKTIKADO DE LA LINGVO EN KVINPETALO

5-9.7. 2021

Post kelkaj jaroj ni denove vizitis la Kultur-centron Kvinpetalo. Ĝi situas proksimume kvardek kilometrojn sude de Poitiers. Post longa paŭzo kaŭzita de pandemio pro la kovim-viruso, kiu aperis fine de la jaro 2019 ni deziris praktiki la lingvon. Kun ĝojo kaj entuziasmo akceptis nin Catherine Kremer. Ni estis la solaj partoprenantoj de la semajna staĝo. Tio taŭgis al ni. Kun ŝi ni faris multajn ekskursojn por ekkoni la proksiman kaj iom foran ĉirkaŭaĵojn.



L'Isle Jourdain

Unue Catherine promenigis nin tra la domaro el kiu konsistas Kvinpetalo. Ni rememoris la ĉambrojn, kie ni staĝis antaŭ ok jaroj. Poste ni promenigis tra la vilaĝo *Bouresse*, kie la kulturcentro troviĝas. Preter la loka preĝejo, ni haltis ĉe la tombejo. Poste ni scivoleme eniris grandan, ĵus aĉetitan bienon de nova posedanto. Antaŭ la tagmanĝo restis iom da tempo por legado. Catherine bone kuiris kaj la najbarino Claudette kontribuis per legomoj el sia ĝardeno kaj pretigis vegetaran manĝon por ni.

La sekvan tagon ni veturis al la proksima urbeto *Lussac-les-Châteaux*,

preterpasante en *Mazerolles* la preĝejon *Saint-Romain* kun speciala mur-sonorilejo unika en tiu regiono kaj registrita kiel historia monumento. En *Lussac* ni vizitis la muzeon de prahistorio. Mi rememoris survivite pentritajn rabobirdojn. La vitrinoj de la muzeo estas dediĉitaj al eltrovaĵoj de la regionaj grotoj. Poste mallonga promeno kondukis nin al grotoj. Starante en akvo impresas grandaj pilieroj de la kastela lev-ponto.



Post la vizito nia vojaĝo direktiĝis al *L'Isle Jourdain* por admiri la viadukton konstruitan inter la jaroj 1881-1884. Ĝi estas je 40,25 metrojn alta, 304 metrojn longa kaj havas 12 arkaĵojn. La fervojtrafiko ĉesis sur ĝi en la jaro 1969. De tie estas bela rigardo al la urbo.

Merkrede ni vojaĝis al la mezepoka urbo *Chauvigny*, kie ni ĝuis eksterordinaran spektaklon de rabobirdoj en la amfiteatro de la ruinigita kastelo el la 12-a jarcento. Prezentiĝis ne nur la diversaj konataj rabobirdoj, sed ankaŭ papagoj, vulturoj, kukaburo, kiu devenas el Aŭstralio kaj Novgvineo kaj iom similas al alciono.




El Sudameriko venis alia, nekutima birdo "Cariama". Ĝi tute ne flugas, sed tamen povas kuri ĝis 25 km hore kaj salti je 3 metroj alte. La tuto estis substrekita per taŭga muziko kaj la prezentistoj en tipaj kostumoj aldonis al la spektaklo specifan atmosferon. Poste ni povis observi diversajn birdojn de proksime en iliaj kaĝoj. Ne mankis ankaŭ cikonioj. La trejniĝo de la birdoj postulas du jarojn por atingi perfektan kapablon de kunmoviĝo. Samtempe ni admiris diversajn florojn kaj plantojn. Subite venis forta pluvo kiu forpelis nin de la loko. Posttagmeze ni vizitis nekropolon; gaŭlo-romian tombejon en *Civaux*. Videblis ŝtonaj sarkofagoj kun skriboj sur la Merovaj kovriloj el la 500-750-aj jaroj post Kristo. Ankaŭ de tie forpelis nin la pluvo. Ne tre fore staras nuklea centralo. Ĝian fumon oni rimarkas de malproksime.

Dum la tuttaga ekskurso ni veturis pli malproksimen. Kunvojaĝis ankaŭ Claudette. Trapasante la urbon *Antigny*, ni por momento haltis en *Saint Savin* kaj eniris la abatejan preĝejon de la 11-a jarcento por vidi navon ornamitan per freskoj. Imponas la alteco de la konstruaĵo je 77 metroj. Ĉe la alveno rimarkiĝas la ponto el la 13-a jarcento sur la rivero *Gar-*

tempe, kiu kunigas la urbojn *Saint Savin* kaj *Saint Germain*. Daŭrigante ni baldaŭ atingis la urbeton *Angles sur l'Anglin*. De malproksime vidiĝis konturoj de la ruinigita fortikaĵo. En turisma informejo ni aĉetis biletojn por viziti ĝin kaj ankaŭ la alian lokon rilatan al prahistorio — *Roc-aux-Sorciers*.

Nia posta celo estis la urbo *La Roche Posay*, kie ni rendevuis kun Bernard Lagrange kaj ni kune piknikis sur benko de la placo. Post la kafumado ĉe proksima trinkejo Bernard promenis nin tra la urbo. Ĝi estas banloko por kuraci haŭtmalsanojn. En ĉefturo ni povis spekti nekutiman videon plafone projekciitan. Ĉie, en tiu ĉi regiono, mi admiris diverskolorajn rozalteo-florojn.



Revene hejmen ni haltis en *Montmorillon* - vizitinda urbo de arto kaj historio. Krom aliaj vidindaĵoj, tie impresigis nin la ekspozicio en la muzeo pri skrib- kaj kalkulmaŝinoj.

Kun Catherine Kremer ni pasigis tre agrablajn tagojn en akompano de ŝia hundeto. Ŝi preparis interesajn itinerojn kaj pro ŝia sperto pri profesia turisma ĉiĉeronino ni multon eksciis. Certe ni ŝatus denove reveni al *Bouresse* kaj viziti aliajn lokojn en la ĉirkaŭaĵo. Venu ankaŭ vi al la Kvinpetalo por subteni kaj revivigi la staĝejon. En trankvila vilaĝo kaj riĉa regiono je vidindaĵoj vi povas pasigi agrablajn tagojn, same kiel ni.

Liba Gabalda

JUBILEANTOJ DE JULIO, AŬGUSTO KAJ SEPTEMBRO 2021

Alice Dudová, Ostrava
Jiří Fanta, Strážnice
Ing Vratislav Hirš, Ruprechtov
Josef Hofman, Plzeň
PhDr Petr Chaloupka, Praha
Marcel Jelšík, Vondrov
JUDr Ludmila Komzáková, Tábor
Ing Jiří Kortus, Blatná
Jan Kukla, Praha
Marie Linhartová, Pardubice
Jiří Machačík, Olomouc

MUDr Jana Pivoňková, Brno
Jana Plamínková, Želetice
František Pohorský, Zlín
Ing. Rudolf Rychlý, CsC., Hradec Králové
Čestmír Suchý, Sokolov
JUDr Jiří Šmidák, Písek
Pavel Šnajdr, Ostrava
Jana Třetinová, Havířov
Karel Vala, Šumperk
Ivana Vítková, Černošice

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras ĉefe sanon, bonhumoron kaj ĉion nur favoran.

Vlastimil Kočvara en magazino Senior



Okaze de 85-jariĝo de nia eksa prezidanto Ing. Vlastimil Kočvara publikigis magazino *Senior* de Moravio regiono en aŭgusto 2021 intervjuon, en kiu la jubileulo rakontas pri siaj junaĝo, studado, laboro, aktivecoj en la ĉeĥa Esperanto-movado kaj ankaŭ en la silezia kulturhistoria organizo *Matica slezská*, pri sia intereso rilate al numismatiko, turismo kaj poemo Majo de K. H. Mácha, kies eldonojn li sisteme kolektas kaj prizorgis ankaŭ eldonon en Esperanto-traduko de Tomáš Pumpr. Simile lin interesas Bukedo de K. J. Erben kaj Sileziaj kantoj de P. Bezruč.


La gazeto *Senior* aperas monate, en ĉiu regiono iom modifita, kaj estas senpage elŝutebla ĉe <https://www.magazinsenior.cz/>

La numeron pri ing. Kočvara vi povas elŝuti el nia domajno www.esperanto.cz/cs/aktuality/clanek-o-vlastimilu-kocvarovi-v-magazinu-senior.html

Esperantistoj en televido



La 2-an de julio 2021 partoprenis en la televida konkurso *Kde domov můj* (Kie mia hejmo) nia membrino Milada Zemanová el Pacov.



La 26-an de julio 2021 okaze de **Tago de Esperanto** elsendis Ĉeĥa Televido 2 enkadre de la ĉiutaga programo *Dobré ráno* (Bonan matenon) interparolon kun Marek Blahuš el Brno pri Esperanto kaj ankaŭ pri la klingona (kiun ŝatas unu el la redaktoroj). En la programo alternas diversaj temoj kaj muziko, ĉiam post kelkaj minutoj. Marek aperis trifoje, povis nur respondi demandojn de la redaktoro kaj redaktorino, kio lin limigis.

En la asocia domajno vi povas ne nur legi artikolon pri la elsendo, sed eĉ aŭskulti la interparolojn (ĉeĥlingve):

<http://www.esperanto.cz/cs/aktuality/o-esperantu-s-markem-blahusem-v-ct2.html>

Ni kondolencas



La 7-an de junio 2021 forpasis en Brno s-ino Marie Klimecká (91-jara).



La 22-an de julio 2021 forpasis s-ino Marie Blažková el Jablonec nad Nisou en la aĝo de 82 jaroj.

Prof. d-ro György Nanovszky (10.04.1942 – 10.08.2021)

En la nomo de la estraro de Hungaria Esperanto-Asocio mi sciigas kun afliktita koro kaj profunda doloro, ke prof. d-ro **György Nanovszky**, nia altestimata prezidanto, Honora Membro de UEA, emerita ambasadoro de la Hungara Respubliko, ekonomo, politologo, religihistoriisto, titola alterneja kaj universitata lekciisto, plurlingva diplomato en kvin kontinentoj, verkinto de dekoj da libroj kaj monografioj, d-ro pri lingvoscienco kaj elstara interpretisto de la lingvo Esperanto forpasis la 10-an de aŭgusto 2021, en la 79-a jaro de sia vivo, al eterna ripozo.




Kun sia morto li postlasis grandan mankon en la vivo de Esperanto. Lia multflankeco, lia personeco kun elstaraj kapabloj kaj lia spirita valoro restos ekzemplodone eterna memoro por ni. Kun sia tria edzino li vivis 39 jarojn en strikta kunesto.

János Nagy, vicprezidanto de HEA


Novaj libroj

Slovaka esperantistino Anna Iváková eldonis sian tradukon de versa libro de Jozef Leikert **Šepot krokov – Paŝflustrado** spegule slovake-esperante, plie renverse. Ŝi jam tradukis kaj eldonis **Tuŝojn je animo** de la sama poeto, kiuj estis prezentitaj dum UK 2016 Nitra.



Fabeloj el la tuta mondo

En aldonajo infanoj el teatra rondo en Havířov legas fabelojn, kiujn en nia klubo ni tradukis el Esperanto al la ĉeĥa lingvo. La instruisto Lukáš Moravec el Havířov, organizanto, trovis la fabelojn en reto kaj prilaboris legadon fare de infanoj. Nun oni povas fabelojn aŭskulti sur [Youtube](#).



Ni eldonis du libretojn "Vyprávěnky" spegule ĉeĥe-esperante. Rete oni povas ricevi de ni fabelojn nur ĉeĥe, aŭ nur esperante. Ankaŭ ekzistas niaj fabeloj, kiujn la paperaj libretoj ne enhavas.

Jindřiška Drahotová

UNESKO-kurieroj 2021

Ĉi-jare aperis jam du numeroj de Unesko-kuriero en Esperanto.



Oceano: Estas tempo por turni la tajdon

Artikoloj: Krizostato – La altiĝo de la marnivelo estas fruestonteca danĝero – Marbordo de Ganao englutita de la maro – Dudek miloj da sonoj sub la maro – Refari la maran vivon – Latinameriko deklaras militon al plasto – Ĉinio: Movebla laboratorio por esplori la marfundon – En Tahitio, laguno dank' al tradicio – Afriko: La pelado pro blua oro – La farado de interregistara oceana komisiono – Nov-Orleano: Nigrulaj kvartaloj omaĝas al usonaj indiĝenoj – Kiu profitas el etnaj etiketoj? – La pandemio: Kulturo kaj turismo centre de la ŝtormo

https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000375277_epo

La 20-aj: Ĉu vere la plej bonaj aĝoj?

Artikoloj: Barato: Junuloj defiitaj de la sankrizo – La pandemio estas ŝanco por ke la gejunuloj serĉu signifon – Generacio Greta – Zomantoj, laŭ iliaj propraj vortoj – Ĉu ĉiuj junuloj estas ciferecaj genioj? – Afrika junularo:

Influantoj havas grandan efikon – Ĉinio: La diversaj vivoj de la oblikva generacio – Trovi novajn manierojn informiĝi – Kreskante en la erao de falsaj novaĵoj – K-pop: Kuraco kontraŭ la pandemia melankolio – La lastaj bild-spektakloj – Konspiraj teorioj: Ligitaj al literaturo – Konspirpensado: Ĉiam utilas propeka kapro – Haitio pridemandas modernismon per siaj kontraŭdiroj kaj limoj – Kiujn lingvojn parolas la kibernetika spaco?

https://unesdoc.unesco.org/ark:/48223/pf0000376726_epo

Estas tre grave subteni la eldonadon per elŝuto de la numeroj (senpage), eventuale per abono de papera versio (27 eŭroj jare).

UEA-KAMPANJO CELAS ANTAŬENIGI ESPERANTON EN EU

Eŭropa Unio (EU) konferencas ĝis printempo 2022 por decidi pri estonta evoluo de la ŝtataro. Kadre de tiu konferenco la eŭropuniaj civitanoj estas invitataj proponi ideojn.

UEA alvokas siajn membrojn loĝantajn en EU-landoj partopreni tiun civitanan konsulton per apogo de proponoj favore al nia lingvo. La UEA-Komisiono por eŭropa agado kunlabore kun Eŭropa Esperanto-Unio (EEU) kaj landaj asocioj kontaktos deputitojn en la Eŭropa Parlamento kaj en membroŝtatoj, atentigante pri la apogo de por-esperantaj proponoj, kaj argumentos por la realigo de tiuj proponoj: [vikio de UEA](http://vikio.de.UEA) (mallonge.net/UEA-vikio). Bonvolu apogi tiujn proponojn:

<https://bit.ly/propono-01>


<https://bit.ly/propono-02>

<https://bit.ly/propono-03>

<https://bit.ly/propono-04>

Novajoj de KAVA-PECH


Stuppnig en pli bela mantelo




Post mirakla elĉerpiĝo de du eldonoj de la interese ga libro de Martin Stuppnig *Home en senhomeco* aperis ĝia tria eldono, male ol la unuaj du nun solide bindita, same kiel estas la dua eldono de la germana originalo kaj la ĉeĥa traduko. Ĉar ankaŭ la ĉeĥa libro elĉerpiĝis, jam okazis ĝia alpresado, do momente estas haveblaj ĉe KAVA-PECH ĉiuj tri lingvaj versioj.

Ludwig Boltzmann: *Vojaĝo de germana profesoro al Eldorado / Reise eines deutschen Professors ins Eldorado*

Tre atentokapta aventuro de monde fama aŭstra fizikisto (1844–1906) pri sia prelegvojaĝo al Kalifornio. La propra teksto estas dulingva, en la germana originalo kaj traduko fare de prof. H. M. Maitzen. Komentojn en Esperanto prizorgis la tradukinto kaj prof. R. Fössmeier.



En preparo:



El iniciato, kaj danke al la financa kontribuo de Vlastimil Kočvara, aperos ankorau ĉi-jare versita dramo *Manon Lescaut* de Vítězslav Nezval laŭ la romano de Abbé Prévost, en la brila Esperanto-traduko de Jiří Kořínek kaj kun aldonaj tekstoj de la iniciatinto.

Petr Chrdle: *Ĉinio, Koreio, Japanio* kun la subtitolo *La landoj similaj, sed diferencaj*. La aŭtoro priskribas siajn impresojn el la landoj, kie (precipe en Japanio kaj Koreio) li havis bonŝancon ekoni la vivon de la lokuloj en iliaj hejmoj, en universitatoj, sed ankaŭ en religiaj centroj. La libro estas preprata en du lingvaj versioj, en la ĉeĥa, kiu aperos ankoraŭ ĉi-jare, kaj en Esperanto. Ĉar la libro estos plenkolora, en pinta kvalito, ĝia eldono estos finance tre postulema. Tial la Esperanto-versio povos aperi nur post kiam revenos per vendoj almenaŭ sentebla parto de la mono enigita en la ĉeĥan eldonon. Por ke pri la ĉeĥa eldono povu ekscii ankaŭ komencantoj, mi daŭrigas ĉeĥe.



Petr Chrdle: *Ĉina, Korea, Japonsko* s podtitulem *Země podobné, avšak rozdílné*.

Autor popisuje své zážitky v uvedených třech zemích, které opakovaně navštívil (Japonsko 10x, Koreu 7x, Čínu 3x). Tam měl možnost (zejména v Jižní Koreji a Japonsku) poznat z blízka jak život v rodinách, tak i na univerzitách a v náboženských centrech. Zaměřuje se mj. na rozdíly života, etikety a vůbec zvyků jednak mezi tím, co mají tyto země společné, avšak rozdílné oproti nám v Evropě, ale také, jaké jsou rozdíly mezi těmito třemi jednotlivými zeměmi. Vyprávění je doprovázeno mnohými barevnými fotografiemi autora pořízenými během cest.

Obsah:

Úvod

Pár kapek z historie

Země podobné, avšak rozdílné

Úvod k následujícím třem kapitolám

Dojmy z Číny

Dojmy z Koreje

Dojmy z Japonska

V době psaní tohoto článku není ještě kniha vysazena, tedy není možné vykalkulovat cenu, ale i tak už nakladatelství vypisuje nabídku předobjednání. **Knihu se bohužel nepodaří vydat před Vánoci. Avšak všichni předplatitelé, kteří ji budou chtít věnovat jako vánoční dárek, obdrží profesionálně navržený a kvalitně vytištěný darovací voucher, na základě kterého obdarovaný dostane knihu ihned po jejím vytištění.**

Při úhradě předem bude cena se slevou 40 %, při nezávazné objednávce a úhradě až po vyjití 25 %. Objednávky prosím směřujte na info@kava-pech.cz, nebo poštou na KAVA-PECH, Anglická 878, 252 29 Dobřichovice.

Petr Chrdle

Ukázka z kapitoly o Japonsku

Ginza je obchodní centrum, které se řadí mezi nejluxusnější na světě. Sídlí tam mnoho významných firem jak místních, tak i japonských poboček mezinárodních společností, které tam také mají své předváděcí prostory (nemám rád moderní „české“ slovo *showroom*).

Navštívil jsem jeden, od firmy Sony, a spíše než jako prezentaci Sony bych to nazval muzeem, protože několik pater je věnováno nejen historii firmy, ale vývoji elektronických zařízení obecně. Středem Ginzy vede rušná široká ulice

s velmi čilým automobilovým provozem. Velice příjemně mne tam ale překvapilo, že každou sobotu i neděli odpoledne se tato rušná ulice stává pěší zónou.

Z Ginzy mám také nezapomenutelný gastronomický zážitek. Procházel jsem se po ní s japonským kamarádem, astronomem a esperantistou. U toho je zajímavé, že jeho velkým vzorem byl náš Antonín Mrkos, s nímž se setkal na nějaké konferenci a který na něj udělal tak veliký dojem, že pod vlivem jedné česky psané knihy, kterou mu A. Mrkos dal s věnováním, se dokonce začal učit česky. Hned jsem ho vyzkoušel a docela se chytil.

Tak tohoto astronoma (na kterého jsem ztratil kontakt a dokonce i zapomněl jeho jméno) jsem pozval na pivo. On zajásal, že to je dobrý nápad, zejména proto, že nablízku je Plzeňská restaurace, kde se dá koupit Prazdroj. Vešli jsme tam a zjistil jsem, že si majitel asi myslí, že Plzeň je stále součástí Rakouska, protože tam na stěnách nebyl jediný obraz z Čech, zato tam převládaly obrazy Alp a rakouských jezer. Ale více než výzdoba mne zaujaly ceny. Bylo to nejdražší pivo v mém životě; za dvě originální třetinkové lahve piva jsem zaplatil pro mne astronomickou sumu. Už si nepamatuji přesně, ale v přepočtu to byly řádově stovky, spíše se blíží tisíci.

Můj japonský kamarád se nechal pohostit malým pivem, ale na oplátku pro nás objednal „typicky české“ jídlo, bavorské klobásy. Nu, alespoň pivem a názvem jsem se cítil jako doma.

Úplnou nabídku KAVA-PECH najdete na <https://kava-pech.cz>

Jak platit svazu

Fio banka Svitavy

Platit lze poštovní poukázkou A (poplatek 36 Kč do 5000 Kč) nebo převodem na účet **2800186228/2010**, **variabilní symbol** má celkem 10 míst - prvních pět je pro vaše číslo svazové legitimace (bez písmene kategorie a doplněné vpředu nulami, např. 00325). Číslo legitimace je uvedeno na štítku při expedici Starta. Dalších pět míst pro variabilní symbol podle účelu platby (viz seznam). Pokud platíte za klub (EK nebo sekci), uveďte své číslo legitimace a pošlete na emailovou adresu Vrat. Hirše seznam, za koho platíte.

Seznam čísel:
(ukončení variabilního symbolu)

- 06940 členství ČES
- 06941 členství UEA
- 06942 předplatné Starta bez členství
- 06943 dary ČES a mimořádné čl. příspěvky
- 06944 poplatek UK
- 06945 kongres EEU
- 50400 komise pedagogická ILEI
- 50401 písemný kurs začátečníci
- 50402 písemný kurs pokročilí
- 50404 Paroliga kurso
- 50405 svazové zkoušky
- 50800 sekce nevidomých LIBE
- 50900 sekce zdravotníků UMEA
- 51000 sekce křesť. esp. KELI,
vlastní b. ú. 211 768 239/0300
- 51100 sekce katol. esp. IKUE,
vlastní b. ú. 2700247564/2010
- 51200 sekce informatiky
- 70100 komise pro tisk a inf.
- 80200 ediční fond
- 80300 propagace v tisku
- 80400 fond Tilio
- 80500 virtuální *adresa@esperanto.cz*

Předplatné časopisů

Předplatné časopisů zajišťuje Pavel Polnický, Lidická 939/11, 290 01 Poděbrady, polnickypavel@seznam.cz, tel. **723 672 335**. Předplatné uhradte na účet u **Equabank**, č. ú. **101 953 9617/6100**, konst. symbol 0379 a variabilní symbol uvedený u jednotlivých titulů. Pokud platíte jednou položkou za více časopisů, pošlete P. Polnickému rozpis platby.

Monato: 1400,- Kč, v.s. 07001, 12 čísel ročně, 36 stran formátu A4, rete 850,-Kč

Juna Amiko: 350,- Kč, v.s. 07004, 4 čísla ročně, 40 stran formátu A5, rete 190,-Kč

Literatura Foiro: 1220,- Kč (*800,- Kč), v.s. 07005, 6 čísel ročně, 56 stran formátu A5 (**cena v závorce platí pro členy "Esperanta civito".*)

La Ondo de Esperanto: reta almanako 420,-Kč

Časopisy a knihy na internetu

Časopisy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitgazetoj.html>

Knihy ke stažení:

<http://esperantobrno.cz/malnova/bitlibroj.html>

Internetový kurz esperanta, třeba pro ty, kteří si chtějí oprášit své znalosti

<https://lernu.net/cs>

**Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
52. ročník**

**Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**

**Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč**
Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117
Uzávěrka příštího čísla:
15.11.2021

**Organo de Ĉeĥa Esperanto-
Asocio 52-a jarkolekto**

**Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj
perantoj aŭ rekte ĉe nia Asocio**

**Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj**

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)
elektronika versio PDF 6 eŭroj
**Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,
Ĉeĥio, starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto**
Presis: DTP centrum, Svitavy
**Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.11.2021**

ISSN 1212-009X

**Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.;
15.11.**

KALENDARO 2021

Aktualaĵojn kaj unuopaj prelegojn sekvu en
Eventaservo.org
kaj [Kalendaro de Esperanto.cz](http://Kalendaro.de.Esperanto.cz)

**(Ĝis nuligo) ĉiumarde virtualaj kunvenoj de E-
Klubo en Brno - gastoj bonvenas!**

info: brno@esperanto.cz

2021-09-18 Festo omaĝe al 120jariĝo de la
Esperantista Klubo en Brno

info: brno@esperanto.cz

2021-10-01/03 ĈEA-konferenco en Bartošo-
vice

info: komitato@esperanto.cz



Jarkunveno en Prostějov (4.2.2021)



Ĉantoria 20.6.2021



*Forgesitaj historietoj de Mladá Boleslav
Jindřiška Drahotová, MUDr. Josef Ččetka kaj
kuratorino de la ekspozicio Lenka Lindauerová*



*Ekskurso tra regiono de Česká Lípa:
Ekspozicia ĉambro en vitrofarejo*



*Esperantistoj dum la Teatra Somero
en la kastelo Kratochvíle 11.7.2021*



Nova ekspozicio en la muzeo: UK-oj



*La 8-a aranĝo BRIKO - Helpu helpi
Prago 18.8.2021*